*Politiko:*

# 10 jarojn de „Raŭlismo“ en Kubo

## la samaj principaj problemoj restis

## malgraŭ alproksimiĝo al Usono

## Fidel Castro 90-jara

### Meditaĵo pri Kubo surbaze de la aktualaj eventoj

*Depost sia enoficiĝo kiel prezidento de Kubo en 2006 Raúl Castro (85) ŝanĝis Kubon pli multe ol lia frato Fidel Castro faris tion dum preskaŭ kvindek jaroj de aŭtokratiisma regado. Al la historiaj sensacioj de la jaro 2016 apartenas la reaktivigo de diplomatiaj rilatoj kun Usono, la tradicia ĉefmalamiko, kiu rezignis nomi Kubon „kanajla“ ŝtato, kaj la malfermo de usona ambasado en Havano. Ankaŭ kun Eŭropa Unio la kubanoj plibonigis la kunlaboron, kaj la germana ministro pri eksterlandaj aferoj, konata pro sia pozitiva diplomatio, unuafoje vizitis Kubon. Kubo kontribuis al la interpacigo de la militantaj partioj de Kolombio kaj preparis subskribon de pactraktato en Havano. Do, la diplomatia mondo moviĝas. La kuba malpermeso de privataj posedo kaj etmerkatumo estis nuligita kaj nova leĝo pri investoj estis akceptita. Ankaŭ la limigoj por vojaĝi estis grandparte nuligitaj, kaj la vizito de la papo emfazis la gravecon de la romkatolika eklezio kiel faktoro de la politika potenco. Malgraŭ tiuj progresoj, kiuj estas ligitaj kun internacia rehabilitado de la kuba reĝimo, la reforma procezo stagnas, kun fatalaj sekvoj. Kritikistoj restas skeptikaj.*

#### Historia vizito de Barack Obama en Kubo en marto 2016

La 21an de marto 2016 la usona prezidento kaj nobelpacpremiito Barack Obama alvenis en Havano por fari historie gravan viziton al Kubo. Sed Raúl Castro, lia kuba kolego, ne bonvolis akcepti lin persone ĉe la flughaveno. Tiu malbonaŭgura signo surprizis la politikajn observantojn kaj la homojn de Havano mem, kiuj timis totalan fiaskon de la vizito. Ne nur la foresto de Castro de la flughaveno, sed ankaŭ la tuta agresema tono de la kubaj gazetaraj medioj celis signali, ke malgraŭ packlopodoj Kubo volas esti distancita de Usono, kiu estas traktata de la kubaj komunistoj kiel ĉefmalamiko de 60 jaroj. Ke Usono ne apartenas al ĝiaj amikoj, tion la kubaj oficialuloj ne maltrafis mesaĝi en ĉiu okazo. Tiel longe ke la embargo kaj la sankcioj ekzistas, oni ne povas paroli pri normalaj rilatoj. Aldoniĝas amaso da aliaj obstakloj, kiuj ne tuj povas fari el malnovaj malamikoj amikojn. Ekzemple la temoj de la demokratio kaj homaj rajtoj ĝenas la kub-usonan dialogon. Sur tiuj kampoj Kubo kaj Usono parolas diversajn lingvojn, cetere ankaŭ sur la tereno de la ekonomio. En tiuj rilatoj la alproksimiĝo povas havi nur limigitan sukceson, ĉar ambaŭ flankoj ne pretas forlasi siajn politikajn kaj ideologiajn principojn. Por emfazi tiun sintenon, antaŭ la vizito de Obama la kuba polico arestis kelkajn disidentojn, kaj Raúl Castro akceptis sinjoron Madura, la aktualan prezidenton de Venezuelo. Per tio la reĝimo en Havano volis demonstri, ke ĝi mem decidas la demandon de la enlanda opozicio kaj ke neniu alia ol Venezuelo estas la vera amiko de Kubo.[1] Kvankam Kubo daŭre dependas de la energio de Venezuelo, ŝajnas, ke Castro

[1] La politikajn amikojn de Kubo Raúl Castro eksplicite menciis dum sia parolado antaŭ la plenkunsido de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2015 (vd. sub http://www.un.org/apps/news/story.asp?NewsID=52020#.V8Q82PmLTIU aŭ https://gadebate.un.org/70/cuba). Intertempe, la politika pejzaĝo de Sudameriko draste ŝanĝiĝis, precipe en Argentino kaj Brazilo, kies maldekstraj ŝtatestroj estis forbalaitaj. La maldekstra politika movado sur tiu kontinento travivas gravan krizon kaj Kubo perdis kelkajn esencajn aliancanojn kaj subtenantojn (vd. http://www.nzz.ch/meinung/kommentare/rechtsrutsch-in-der-region-suedamerikanische-pendelschlaege-ld.112546).

estas tre interesata normaligi la rilatojn kun Usono. La gestoj de Raúl dum la vizito de Obama klare indikis tiun intencon.[2]

Post 88 jaroj iu usona prezidento do revizitis Kubon. Nature, Obama ne hezitis pledi por pli multe da politika libereco en tiu socialisma lando. En sia parolado, kiun li prezentis en la Granda Teatro de Havano la 22an de marto 2016[3] kaj kiu estis dissendita de la ŝtata televido,[4] li ofertis al Kubo kaj la kubanoj pacon kaj amikecon, promesis kunlaboron kaj progreson: „Usono kredas je la demokratio“ kaj „je la kuba popolo“, kiun li konsideras „inovacia“, kiel Obama diris en Havano. La prezidento ankaŭ emfazis, ke Usono ne volas normaligi la rilatojn nur kun la kuba registaro, sed kun la kuba popolo. Obama samopinias kun Castro, se temas pri „la estonteco de la kubanoj“, kiu estu „decidita de la kubanoj mem“. Tamen, „la kubanoj havu la rajton kritiki la kuban registaron,“ Obama admonis. Sed Usono volas respekti la suverenecon de Kubo. Obama, kiu celas likvidi la restaĵojn de la Malvarma Milito en Ameriko. Inter alie, li anoncis pliajn paŝojn de la alproksimiĝo, ekzemple ke usonaj aviadiloj baldaŭ rekte flugos al Kubo[5] por konformi al la bezonoj de la turismo, kiu devus alporti pli da mono, kiu estas ne malhavebla por la ekonomio de la insulo. La fortigo de la kunlaboro koncernu ankaŭ poŝton, trafikon kaj mediprotektadon, sansistemon, agrikulturon kaj la lukton kontraŭ la droga komerco. Sed ekzemple ĉe la malfermado de la interreto ekzistas diverĝaj vidpunktoj. Dum Obama deziras, ke ĉiuj kubanoj havu liberan aliron al ĝi, Castro volas limigi ĝin pro kialoj de „naciaj interesoj“. Por vera normaligo de la rilatoj por Castro estas esencaj la nuligo de la ekonomia kaj financa embargoj, kiuj koncernas krom la komerco kaj kapitalo ankaŭ la internaciajn kreditojn por Kubo, kiu ne estas membro de la Interamerika Evolubanko (IDB), kaj la plena redono de Guantánamo Bay al Havano. Tiuj estas fortaj kriterioj de Havano, kiujn Usono ne povas ignori. Fakte, tion Obama promesis fari, sed la usona Kongreso, kiu estas la sola instanco, kiu povas forigi la sankciojn kontraŭ Kubo, obstine kontraŭstaras ĝin. Kompreneble, daŭre ekzistas diversaj opinioj rilate la politikajn modelojn, demokration, homajn rajtojn, balotojn, socian sekurecon kaj pacon. Castro ree kritikis Usonon pro laŭdira politika manipulado kaj ambivalenta sinteno rilate la homajn rajtojn.[6]

Kompreneble, la brila parolado de Barack Obama en Havano metis la kuban ŝtatestron sub forta premo. Jam en antaŭa gazetara konferenco, Raúl Castro, kiu ne kutimas fari gazetarajn konferencojn kun tia gasto kaj kun tia publiko, montriĝis nervoza kaj malcerta. Al demando de ĵurnalisto pri la aktuala stato de la politikaj malliberuloj en Kubo, da kiuj laŭ diversaj fontoj ekzistas ankoraŭ 50 ĝis 80, Castro reagis kun ĉagreno kaj celis kredigi, ke politikaj prizonuloj ne plu ekzistas en Kubo.[7] Anstataŭe, la kuba reĝimo traktas ilin nun kiel simplajn krimulojn.

Unuafoje en la Palaco de la Revolucio eksonis la usona himno.[8] Obama promenadis en la malnova urbo de Havano kaj renkontis en la katedralo la ĉefepiskopon. Kaj li dankis pro la „varma akcepto“ en Kubo. Malgraŭ ĉiuj diferencoj, Obama konkludis, ke „tio estas nova tago, ni moviĝas antaŭen kaj ne rigardas malantaŭenen.“

Certe, multaj kubanoj sincere admiras Obamon kaj ĝojis pri lia vizito. Ili estas dankemaj al li, ke li kaŭzis la historian turniĝon en la kub-usonaj rilatoj. Sed ili ne havas iluziojn kaj ne kredas, ke lia vizito tro ŝanĝos Kubon tuj. La homoj scias, ke ili mem devas ŝanĝi la landon. Sed tiel longe ke la Castro-fratoj vivas kaj havas la potencon, oni restas skeptika pri tia ŝanĝo, kiu povas esti bremsita kaj

---

[2] Vd. ekzemple jenan bildon: http://www.blick.ch/news/ausland/erstmals-seit-ueber-50-jahren-es-gibt-wieder-einen-linienflug-von-den-usa-nach-kuba-id5440139.html.

[3] La anglan tekston vd. sub https://www.whitehouse.gov/the-press-office/2016/03/22/remarks-president-obama-people-cuba kaj https://www.youtube.com/watch?v=wEw3H0C-Lj8.

[4] Vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/barack-obama-ruft-in-historischer-rede-zur-versoehnung-mit-kuba-auf-a-1083668.html.

[5] Vd. http://www.merkur.de/politik/nach-jahren-erster-flug-zwischen-kuba-fluege-taeglich-geplant-zr-6694378.html, http://www.spiegel.de/reise/aktuell/nach-50-jahren-erster-direktflug-zwischen-usa-und-kuba-hebt-ab-a-1110330.html kaj http://www.blick.ch/news/ausland/erstmals-seit-ueber-50-jahren-es-gibt-wieder-einen-linienflug-von-den-usa-nach-kuba-id5440139.html.

[6] Laŭ http://www.nzz.ch/international/amerika/grenzen-der-annaeherung-1.18716678.

[7] Laŭ http://www.welt.de/politik/ausland/article153569523/Bei-einer-Frage-kam-Ra-l-Castro-richtig-ins-Schwitzen.html.

[8] Laŭ https://www.tagesschau.de/ausland/kuba-obama-113.html.

blokita de ili. Ĉar la ŝtata televido rare kaj magre raportis pri la vizito de Obama, la kubanoj devis utiligi alternativajn mediojn kiel la kanalon Tele Sur aŭ, nature, la interreton. Tiu kazo montras, ke kaŝi gravajn okazaĵojn antaŭ la kuba popolo, kiel la komunistoj kutimis praktiki kaj daŭre praktikas, ne plu eblas.[9]

Dum la homoj de Kubo do entuziasmis pri la vizito de Obama, kiu aperis kun siaj edzino, du filinoj kaj bopatrino, Fidel Castro, la „olda griza eminentulo“, kies spirito daŭre staras super ĉio kaj ĉiuj, tute ne ĝojis pri tiu historia evento, kiu estis aranĝita de lia frato Raúl. En la gazeto *Granma*, oficiala organo de la Centra Komitato de la Komunisma Partio de Kubo, Fidel Castro komentaĉis la havanan paroladon de Obama laŭ sia maniero kaj skribis, ke „ni ne bezonas donacojn de la imperio“, ĉar „ni mem kapablas produkti la necesajn nutraĵojn.“ Aŭdante la paroladon de Obama, oni riskas ricevi „infarkton“, Fidel malice aldonis, kaj rememorigis longan liston de konfliktoj inter Kubo kaj Usono. La pacigajn, „mieldolĉajn“ (aŭ mielvoĉajn, hisp. almibaradas) vortojn de Obama la maljunega revoluciulo ne povis elteni kaj krude rifuzis kiel malseriozaĵon. Obama „prefere pripensu siajn proprajn aferojn kaj ne klopodu ellabori teoriojn pri la kuba politiko“, li konsilis.[10] Sendube, la vortoj de la „ĉefkomandanto“ daŭre havas enormajn signifon kaj influon por multaj kubanoj, ĉefe maljunaj, kaj pli junaj ne kuraĝas publike pridubi ilin, timante reprezaliojn flanke de la aŭtoritatoj. Por Fidel Castro kaj liaj adeptoj Usono restos la historia ĉefmalamiko, cinika imperio, kiu volas forgesi la pasintecon, la historiajn krimojn, kiujn ĝi faris al Kubo per sia politiko de embargoj kaj blokadoj. Sed Castro tute ne intencas perfidi la idealojn de la kuba revolucio. Certe, ankaŭ liaj vortoj pri paco kaj frateco, sonas „mieldolĉe“. Fidel Castro verŝajne parolas pri alispecaj paco kaj frateco kaj neniam trovus interkonsenton pri la ĝusta kompreno, ĉar iliaj ideologiaj mondkonceptoj ne kongruas, kvankam ambaŭ volas nur bonon. Tamen, ŝajnas, ke pro lia modesta deveno Castro pretas almenaŭ respekti Obamon, naskitan en 1961, du jarojn post la kuba „revolucio“, kiel homon, eĉ kiel „fraton“ (hermano). Certe, Obama signifas ne malgrandan embarason, eĉ defion por Fidel. Oni ne povas kondamni lin kiel usonan imperiiston aŭ aĉan kapitaliston. Kiu do estas la vera kredo de Fidel Castro pri Barack Obama, kiun li menciis kun Mandela en la sama alineo de sia artikolo, restos enigmo.

## Papoj, Venezuelo kaj nordamerikaj turistoj kiel savantoj de Kubo

Kelkfoje do tamen okazas mirakloj. Okaze de la vizito de la romkatolika papo al tiu komunisma lando en 2015, Francisko renovigis la vortojn de sia antaŭulo Johano Paulo IIa de januaro 1998: „Malfermiĝu Kubo al la mondo kaj malfermiĝu la mondo al Kubo!“[11] Intertempe tio okazis. La diplomatiaj rilatoj inter Kubo, kiu malgraŭ ĉio restis katolika lando, kaj Vatikano neniam estis interrompitaj, eĉ Benedikto XVIa (Jozefo Ratzinger) vizitis la insulon de la ateistoj. Malgraŭ klaŭzo pri demokratio, Kubo estas plenmembro de la latinamerika ŝtata komunumo CELAC kaj probable ricevos tiun statuson ankaŭ en la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAS). Krom tio, Kubo nun havas diplomatiajn rilatojn kun preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo, inkluzive Usonon.

Jam la 17an de decembro 2014 la prezidentoj Barack Obama kaj Raúl Castro festis la reaktivigon de la diplomatiaj rilatoj inter Usono kaj Kubo en paralelaj televidaj elsendoj. En la senco de la bona volo, la akto estis efektivigita senkondiĉe por Kubo. La 29an de majo 2015 Kubo estis forstrekita de la usona listo de „kanajlaj“ ŝtatoj. Kaj tamen la reĝimo de Havano ne rezignis pri daŭraj malicaj retorikaj atakoj kontraŭ Usono. Por la maljunaj komunistoj en Havano la sincera kaj iom skandala publika proklamo de Obama, ke la ĝisnuna usona politiko rilate al Kubo finiĝis en fiasko, estis misuze festata de tiuj mem fiaskintaj komunismaj politikistoj kiel propra triumfo. Sed ŝajnas, ke tiaj fiaj ludoj

---

9 Laŭ http://www.derbund.ch/ausland/amerika/kuba-signalisiert-klar-die-usa-gehoeren-nicht-zu-unseren-freunden/story/28125841

10 Laŭ http://www.spiegel.de/politik/ausland/kuba-fidel-castro-kritisiert-obama-besuch-a-1084383.html kaj http://www.faz.net/aktuell/gesellschaft/menschen/fidel-castro-spottet-ueber-barack-obamas-rede-auf-kuba-14148277.html. La koncerna artikolo de Fidel Castro en *Granma* estas trovebla sub http://www.granma.cu/reflexiones-fidel/2016-03-28/el-hermano-obama-28-03-2016-01-03-16.

11 Vd. https://www.tagesschau.de/ausland/papstbesuch-in-kuba-103.html. La tekston de la alparolado de la papo Francisko vd. sub https://w2.vatican.va/content/francesco/de/speeches/2015/september/documents/papa-francesco_20150919_cuba-benvenuto.html.

praktike interesas neniun plu en la mondo. La ŝtataron multe pli scivolemas pri la demand, ĉu kaj kiel la internacia agnosko de la Kastra reĝimo influos la reformprocezon en Kubo. Du scenarioj estas imageblaj: Je la unua flanko, la pli malforta ekstera premo povus doni al la havana reĝimo pli da tempo por bremsi kaj prokrasti la politikan malfermiĝon. Aliflanke, pli proksimaj kaj bonaj rilatoj kun la Okcidento povus akceli la reformprocezon. Dume ekzistas pli da supozo por la unua scenaro. La ambivalenta politiko de Usono kaj Eŭropa Unio gvidi dialogon kun la kuba registaro kaj konservi la sankciojn liverus al ĝi argumenton kontraŭ pli rapida malfermiĝo, do povus esti avantaĝo por la Kastro-reĝimo. La politika diskurso pri nacia memstareco, kiun la reĝimo nuntempe praktikas, kontrastas kun la ekstera ekonomia dependeco de la lando, kiu importas 70 procentojn de la nutraĵoj kaj 52 procentojn de la energio. La ekstera politiko de Kubo reprezentas la tradiciajn trajtojn kaj principojn kun la celo de la regantaj komunistoj konservi la povon, eviti politikajn koncedojn (pri demokratio kaj homaj rajtoj) kaj malhelpi rapidan efektiviĝon de merkatekonomiaj reformoj. Oportunismaj aliancoj kun diversaj eksterlandoj, kiuj estas regataj de parencaj maldekstraj kaj kontraŭ-usonaj reĝimoj, ekzemple Venezuelo, Bolivio aŭ Ekvadoro, helpu plilongigi la vivon de la Kastro-reĝimo. Plej kurioza ekzemplo estas la alianco kun la „ĉavisma“ reĝimo en Karakaso, kun kiu ekzistas ekonomia interŝanĝo. De Venezuelo Kubo ricevas malmultekostan nafton, kaj kubanoj – ĉirkaŭ 40´000 – laboras en Venezuelo kiel kuracistoj, instruistoj kaj sekurecaj oficistoj por subteni la „bolivaran revolucion“, kiu mem estas elĉerpita. Por tiuj laboristoj kaj fakuloj la kuba ŝtato ricevas multe pli altajn salajrojn de Venezuelo kompare kun tiuj, kiujn Havano povas pagi, kio ruze kreskigas la devizajn rezervojn de Kubo. Tiel, preskaŭ 40% de la kuba ekstera komerco dependas de Venezuelo. Sed kiel longe ankoraŭ? Rapide malkreskantaj prezoj por nafto kaj la mizera ekonomia kaj malfacila politika situacio de Venezuelo devigis la kuban registaron ŝanĝi la prioritatojn de sia ekstera politiko. Ŝajnas, ke Raúl Castro komprenis, ke la plibonigo de la rilatoj kun Usono estas neevitebla kaj krome povas promesi la ekonomian pluekzistadon de la kuba reĝimo. Ĉu tiu politiko de la alproksimiĝo estas do pure oportunisma intenco, el kiu profitos ĉefe la klano de la Castro-j plus kelkaj ruzaj kubaj komercistoj, kiuj eluzas la novajn ekonomiajn liberecojn? Kaj vidu, la politika alproksimiĝo jam montris la unuajn pozitivajn sekvojn ekonomiajn. Sole pro kelkaj embargaj nuligoj, kiujn la usona prezidento decidis sen demandi la Kongreson, la kuba ekonomio kreskis en la unua duonjaro 2015 je 4,5 procentoj (kompare kun 1,3% en la antaŭa jaro). La mildigo de la usona malpermeso vojaĝi al Kubo (jes, ankaŭ tio ekzistis) sekvigis rapidan disvolviĝon de la turismo: Sole inter januaro kaj majo 2015 preskaŭ 52´000 usonanoj vizitis la insulon. Jam en 2014 venis 91´000 homoj el Usono, kaj entute 400´000 usonanoj de kuba deveno vojaĝis al Kubo por renkontiĝi kun siaj familioj. Sed kompare kun unu miliono da kanadanoj, kiuj ĉiujare vizitas Kubon, tiuj nombroj estas malgrandaj. En kazo ke la embargo estos komplete nuligita, oni atendus kelkajn milionojn da usonaj turistoj ĉiujare.

## Kion la kubanoj konkrete faris ĝis nun?

La plej grava kaj granda reformpakaĵo, pri kiu la kubaj komunistoj ĝis nun decidis okaze de sia partia kongreso en aprilo 2011, konsistas el 300 sociaj kaj politikaj rimedoj, kiuj koncernas la „aktualigon de la kuba ekonomia kaj socia modelo", kiel tio oficiale nomiĝas en Havano. En la praktiko temas pri ŝparaj kaj privatigaj projektoj. En la preamblo de la koncerna dokumento Raúl Castro anstataŭigis la sloganon de Fidel „batalo de la ideoj“ per „batalo ekonomia“. Du jarojn poste sekvis nova leĝo pri migracio, kiu praktike nuligis la ĝisnunan malpermeson de la vojaĝado. Krom tio, akceptiĝis nova pli liberala leĝo pri investado, kiu laŭ optimismaj pritaksoj allogu ĝis 30 procentoj de nova kapitalo al la lando. De tiam la socialisma planekonomio kunekzistas kun kapitalismaj enklavoj. Sed la reforma pakaĵo de 2011 oficialigis jam delonge okazintan praktikon, precipe koncerne la kampojn de la turismo, gastronomio kaj agrikulturo, kie malgrandaj privataj entreprenoj ekzistas jam de kelka tempo. Duonmiliono da kubanoj, kiuj estas nomataj „cuentapropistas“, laboras hodiaŭ je propra kalkulado. Sed la privata sektoro ampleksas ne pli ol unu kvarono de la tuta ekonomio de Kubo, kiu en sia esenco restis „socialisma“ ŝtato. De tiu privata ekonomio la ŝtato profitas de la imposta juro, kiu same estis reformita. Lastatempe oni permesis al tiuj entreprenistoj ankaŭ preni malgrandajn kreditojn de ĝis 400 usonaj dolaroj ĉe landaj bankoj. Krom tio, la sendependuloj pluinvestas grandparton de la mono, ĉ. 1,8 miliardoj usonaj dolaroj, kiun familianoj el eksterlando ĉiujare sendas al Kubo. Ĉi tiu mono estas samtempe ankaŭ la plej esenca deviza fonto de Kubo. Sed la privata sektoro de Kubo ne koncernas strategiajn kampojn

kaj limiĝas al la sfero de malaltaj salajroj. Pro tio ne eblas malfermi en Kubo ekzemple privatajn advokatan oficejon, kuracistan praktikejon aŭ konsilistan firmaon. Ankaŭ la du monunuoj, la peso kaj la konvertebla peso CUC, kiuj funkcias sendepende unu de la alia, ĝis nun ne estis kunigitaj. La registaro hezitas fari tion, ĉar ĝi timas inflacion kaj aliajn riskojn, inter alie sociajn maljustecon kaj protestojn. Jam nun ekzistas gajnintoj kaj perdintoj de la „aktualigo de la ekonomia modelo“, t.e. de la permeso de la privata sektoro, ĉar tuj aperas entreprenistoj, kiuj rapide riĉiĝas aŭ celas rapide riĉiĝi. Al la perdintoj apartenas precipe tiuj, kiuj ne havas parencojn en Usono kaj ne ricevas monon el eksterlando, same pensiuloj, nigruloj (aŭ malblankuloj) kaj ĉiuspecaj mizeruloj. Kvankam la subvenciita nutraĵkarto nomata „Libreta“ daŭre ekzistas, en ŝtataj vendejoj oni povas praktike nenion aĉeti.

En 2011 la kuba registaro ankaŭ anoncis, ke ĝi intencas maldungi 1,5 milionojn da laboristoj (ĉ. 36%) de la ŝtata sektoro, ĉar ankaŭ la publika sektoro dungas tro da laboristoj, por eviti altigon de la oficiala senlaboreca kvoto de 3,8%. Sed en Kubo la reformoj evoluas tre malrapide, kaj, certe, la reformprocezo de Kubo estas neniel komparebla kun tiu de Ĉinio aŭ Vjetnamio. Kompare kun la vjetnama, la kuba merkato estas okfoje pli malgranda, kaj ĝi ankaŭ ne estas junulara kaj dinamika, sed karakterizita de strukturo de amaso de maljunuloj, kio signifas gravan ekonomian kaj socian problemon. Kubo ankaŭ ne povas profiti de la pozitivaj spertoj de najbaraj landoj kiel Vjetnamio povis fari tion. Sed malgraŭ ekonomiaj problemoj laŭ kriterio de la t.n. „homa evoluo“ Kubo okupas pli altan rangon en la statistiko ol ekzemple Kroatio, nome la 44an rangon en 2014. Kubo daŭre sendas kuracistojn kaj instruistojn al Afriko kaj Latinameriko. Laŭ Transparency International en Kubo korupto estas malpli granda problemo (rango 63 de 174 ŝtatoj) ol en Brazilo, Meksiko aŭ Venezuelo, kiuj okupas pli altan rangon. Ankaŭ la organizado de la savado okaze de naturkatastrofoj en Kubo estas pli efika ol en la najbaraj landoj de la regiono.

Malgraŭ ĉiuspecaj malhelpoj, la reformprocezo, kiel ĝi estis komencita sub Raúl Castro, ne plu estas reprenebla, same kiel en Vjetnamio, kiu estas regata de komunistoj. Kaj la akcepteco de la regado de Raúl Castro estas mezurata laŭ efiko kaj rezultoj, ne plu laŭ la ideologia kaj politika karismo de lia frato Fidel, kiu la 13an de aŭgusto 2016 fariĝis 90-jara.[12] Eĉ la kontraŭ-usonismo fariĝis malpopulara en Kubo. Kompare kun Fidel, kies regado estis arbitra kaj neantaŭvidebla, frato Raúl, kiu estas konata pro malŝvela maniero prezenti la aferojn kaj pragmatisma sinteno, tenis kion li promesis: a) kontrolitaj reformoj, b) renovigo de la rilatoj kun Usono, c) modernigo de la politika sistemo. Tio estas multo, pli multo ol atendite.

Aliflanke, la regado de unusola partio, la elstara rolo de la armeo, la fermita cirklo de politikaj funkciuloj, la reprezalioj kontraŭ kritikistoj, la cenzurado de la gazetaro kaj la ĝenerala sistema subpremado de la bazaj liberecoj renkontiĝi kaj libere esprimi opinion daŭre karakterizas la aŭtokratecan politikan Kastro-sistemon de Kubo kaj ĝenas la progreson. Malgraŭ tio, ene de la politika aparato okazas politikaj kaj sociaj ŝanĝoj. Ekzemple, Raúl Castro limigis siajn politikajn mandatojn al dek jaroj. Post skandaloj li anstataŭigis diversajn malnovajn „fidelistajn“ oficistojn kiel la iaman ministron pri eksteraj aferoj, *Felipe Pérez Roque,*[13] aŭ la ministron pri ekonomio, *Carlos Lage Dávila,*[14] per „raŭlistoj“, kiuj estas esence soldatoj. Kvankam li estas konsiderata kiel ´griza´ teknokrato el la interno de la partia aparato, vicprezidanto *Miguel Díaz-Canel Bermúdez* (56-jara)[15] estas unu el la reprezentantoj de la ´nova generacio´, kiu eble fariĝos nova prezidento de Kubo post la demisio de Raúl, kiu eble okazos baldaŭ, nome en februaro 2018. Alia „raŭlisma“ protagonisto estas *Marino Alberto Murillo Jorge* (55-jara),[16] elstara ekonomiisto kaj membro de la politburoo, vicprezidanto de la konsilio de ministroj kaj praktika ĉefrespondeculo pri la ekonomio kaj ekonomiaj reformoj en Kubo. Krome, en balotoj al la municipoj povis kandidatiĝi du opoziciuloj. Nun ankaŭ pli multaj virinoj estas reprezentataj en la Nacia Asembleo.

[12] Biografiajn notojn vd. sub http://www.nzz.ch/international/aktuelle-themen/fidel-castro-wird-90-kubas-unsterblicher-revolutionsfuehrer-ld.110599, http://www.spiegel.de/politik/ausland/fidel-castro-wird-90-noch-immer-der-comandante-a-1107333.html http://www.welt.de/politik/ausland/article157629811/Wir-werden-unsere-Ideale-nicht-verraten.html.
[13] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Felipe_Pérez_Roque.
[14] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Carlos_Lage_Dávila.
[15] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Miguel_Díaz-Canel kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Politics_of_Cuba#Council_of_Ministers
[16] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Marino_Murillo.

La parlamentanoj, kiuj ĝis nun havis praktike neniujn kompetencojn kaj nur dufoje jare kunvenis por formale akcepti la decidojn de la ŝtata konsilio, komencas emancipiĝi kaj postulas pli da rajtoj. Reformo estas planata, kiu antaŭvidas redukton de la nombro de parlamentanoj, kiuj nunteme estas 600, kiu estas multe tro alta por malgranda lando kun 11,27 milionoj da loĝantoj (2013). Kvankam ampleksa reformo de la konstitucio ne troviĝas sur la politika tagordo, ĝi almenaŭ estas vigle diskutata en kaj ekster Kubo kaj en diversaj blogoj de la interreto, kiu intertempe estas uzata de 25% de kubanoj. En la interreto okazas ankaŭ diversaj civitanaj debatoj, kiuj malgraŭ ŝtata kontrolado de la medio praktike ne estas malhelpataj de la reĝimo, tiel ke la nacia kaj internacia komunikado komencas pli vaste kaj efike fluadi, kaj interretaj kafejoj estas tolerataj. Ankaŭ la opozicio mem ne plu estas sisteme persekutata aŭ pedante ĉikanata. Pli ol 200 politikaj malliberuloj estis liberigitaj el la prizonoj, kaj eĉ disidentoj rajtas vojaĝi eksterlanden kaj reveni al Kubo. Ankaŭ la kubanoj en la ekzilo ne plu estas konsiderataj kiel „malamikoj de la revolucio“. Gravan rolon en tio ludas la premo flanke de la civilsocio kaj de la katolika eklezio. La papoj ripete postulis pli da religia libereco por la kubanoj.

Malgraŭ plej diversaj sistemaj obstakloj, en Kubo okazas nova socia printempo. La alproksimiĝo al Usono, la internacia agnosko de Kubo kaj la garantiado de pli da liberaj spacoj por la privata aktiveco de la civitanoj unuflanke havigis al la kuba reĝimo pli grandan akcepton, sed aliflanke eksplodigis en- kaj eksterlande ankaŭ diskutojn pri la estonteco de Kubo. Ĉu tiuj diskutoj entenas ankaŭ la demandon de la punado de la krimoj, kiujn la komunistoj faris en Kubo, ne estas konate (al mi). La reveno al malnovaj tempoj ne plu estas imagebla. Kvankam sub Raúl Castro la malfermiĝo okazas malrapide kaj singarde en formo de politiko de malgrandaj paŝoj, ĝi neeviteble ŝanĝis kaj ŝanĝos la landon konstante kaj kun daŭra efiko. Kvankam iu posteulo de Raúl, kiu ne plu apartenas al la familio Castro, ne plu posedos la saman karismon, oni povas imagi, ke post la morto de la Castro-fratoj la „kastrismo“ estos forbalaita en Kubo, ĉar ĝi funkcias nur kiel bremso.

Sed ankaŭ la ambivalenta politiko de Usono kaj Eŭropa Unio malakcelas la reformojn en Kubo. Pli da kunlaboro estus dezirinda kaj necesa por ripeti la sukcesan transformadon de la socio kaj ekonomio, kiel travivis ĝin la orienteŭropaj landoj. Certe, venis ankaŭ la tempo por nuligi la embargon kaj la sankciojn kontraŭ Kubo. Tion eĉ Unuiĝintaj Nacioj postulas jam de jardekoj. La ideon subtenas 72 % de la usonanoj kaj eĉ 55% de la membroj de la Respublika Partio. La plimulto de usonanoj kaj kubanoj en la ekzilo kaj la usona komerca lobio do apogas la novan politikon. Refalo en la Malvarman Militon, kiel iuj usonaj respublikanoj postulas kaj esperas, estus malpopulara ankaŭ en Usono. Sed la kuba registaro havas malgrandan intereson konduki la intertraktojn kun EU al la fino, ĉar tio estus ligita kun gravaj kompromisoj rilate la plibonigon de la situacio de la homaj rajtoj kaj de la demokratio. La kondiĉoj de EU por normalaj rilatoj kun Kubo dependas de ĉi-rilataj progresoj en Kubo. Tion la Kastro-reĝimo ege timas kaj intencas eviti. La registaro en Havano ne povas permesi al si „perdi la vizaĝon“, kaj la Eŭropa Unio ne pretas fari koncedojn, kiuj subfosas tiujn kondiĉojn.[17] Embarasa situacio por ambaŭ flankoj. En Kubo la „kastrismo“ probable estus definitive elĉerpita kaj morta kaj en Eŭropo la homrajta politiko diskreditita. Verŝajne oni devas ankoraŭ atendi, ĝis la politikaj premisoj en Kubo radikale ŝanĝiĝos kaj la komunistoj estos for.

## Partia kongreso okazis en aprilo 2016

Dum la kongreso de la Komunisma Partio de Kubo, kiu okazis en aprilo 2016 en Havano, Raúl Castro avertis, ke la reformoj restos limigitaj al la ekonomio kaj konfirmis, ke la socialisma ekonomia modelo restos konservata. Ĉar pri la maniero de la organizado de la kongreso aperis kritiko en la partio mem, Castro kondamnis la malnovajn kutimojn kaj la burokratiismon, sed konkretajn sekvojn el tiu kritiko por plibonigi la aferojn li ne sciigis. Li anoncis modifon de la konstitucio, kvankam temos nur pri aktualaj adaptoj, ĉar la monopolo de la socialisma sistemo kaj de la komunisma partio ne estu tuŝita. La modifoj eble havos signifon ĉefe por lokaj, municipaj problemoj. Ankaŭ en la ekstera politiko Castro restis rigida kaj obstina: Enmiksiĝon de ekstere ne estos tolerata, kaj pri la demokratio kaj plureco de la

[17] Laŭ http://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/zehn_jahre_raulismo_in_kuba.html.

opinioj li serĉis, ke Kubo ja havas lin kaj lian fraton. Sed neniu plu ridis. Tiu ĉi kongreso, kiu estas kunvokita nur ĉiujn kelkajn jarojn, verŝajne estis la plej lasta de la malnova generacio de kubaj politi-kistoj. La venonta laŭvica partia kongreso okazos nur en 2021. Do, generacia ŝanĝo okazos vole-nevole, devige, aŭtomate kaj nature.

## Rolo de la Castro-familio

Kiel dirite, Raúl Castro, jam 85-jara, komunikis, ke li demetos siajn ŝtatajn oficojn en (februaro) 2018. La ekstera publiko apenaŭ rimarkis, ke Raúl intertempe reguligis ankaŭ la rilatojn inter la familianoj, kio influis ankaŭ la politikon. Raúl fidas nur al siaj infanoj, nepoj kaj malmultaj proksimuloj en la armeo, kaj li volas eviti, ke´ortodoksuloj´ malfaciligos lian vivon post la retiriĝo. Raúl ne nur faris familian planadon, sed ligis ĝin ankaŭ kun grandstila purigo de homoj en la partio, kiuj ne plaĉis al li, dum liaj fidindaj proksimuloj ricevis pli da povo. Do, la politika potenco en Kubo antaŭvideble restos en la manoj de la Castro-klano, kiu gvidas Kubon kvazaŭ kiel familian entreprenon kaj plu kontrolas la armeon. La 51-jara filo de Raúl, kolonelo *Alejandro Castro Espín*, kiu estas politologo, funkcias kiel kunordiganto de la sekretaj servoj en la armeo kaj ministerio de la internaj aferoj kaj gvidas la ege efikan sekurecan, subpreman kaj spionan aparaton, kiujn li kontrolas kune kun la patro. Li respondecas ankaŭ pri la batalo kontraŭ korupto. La bofilo, t.e. eksedzo de la Raúl-filino Deborah, *Luis Alberto Rodríguez* (ĉ. 50), kiu estas brigada generalo kaj ĉefo de la administrado de la entreprenoj de la revolucia armeo (Gaesa), kontrolas la industrion, turismon kaj pliparton de internaciaj komunaj firmaoj (Joint Ventures). Li gvidas imperion, kiu administras miliardojn da dolaroj sen devigo prezenti ciferojn, kalkulojn aŭ bilancojn. Ĉar li neniam elpaŝas publike, la kubanoj ne vere scias pri kia homo vere temas. Aleksandron oni vidas pli kaj pli ofte ĉe oficialaj momentoj, kiuj laŭ la protokolo verdire estas rezervitaj al la vicprezidantoj aŭ ministroj. Tiu homo ludis ankaŭ esencan rolon en la alproksimiĝo kun Usono, kvankam en 2009 li ankoraŭ publikigis libron pri Usono, kiun li karakterizis kiel „teror-imperion". Dum sia vizito en Kubo Obama bonvenigis lin kore kiel malnovan kamaradon aŭ amikon per la vortoj „Bone revidi vin". La nomitaj familioj, kiuj ankoraŭ ne havas gravajn partiajn funkciojn, povus esti iusence konkurentoj de vicprezidento Marino Murillo kaj Miguel Díaz-Canel, la dua homo de la KP, kiuj estis menciitaj supre.[18]

Alia filo de Raúl, *Antonio* (47), estas grava sportfunkciulo, pasia golfludanto kaj fikonata pro diversaj skandaloj, ĉar li tute ne ŝatas paparacojn, kiujn li kelkfoje fizike atakis. Kiel ĉiuj Castro-j ankaŭ li ĝuas ĉiujn privilegiojn de la nomenklaturo, sed kiel skandalulo li estas dorno en la okuloj de la patro. Filino *Mariela* (53) avancis kiel grava persona konsilistino de la patro. Kiel profesia psikologino ŝi funkcias kiel ĉefa proparolanto por la aferoj de la samseksemuloj en Kubo, jam de 25 jaroj, kadre de la „Nacia Centro por seksa klerigo". Ŝi oficas kiel deputito de la kuba parlamento kaj ŝatas doni al la internacia gazetaro intervjuojn pri politikaj temoj. Laŭ ŝia konvinko estas tempo, ke virino fariĝu prezidento de Kubo, lando de la masklismo. Finfine, nepo *Raúl(ito) Rodríguez* servas kiel ĉefa gardisto de Raúl. Por la kubanoj, kiuj nomas lin „la kankreto", li estas ne pli ol ridinda ŝercfiguro, ĉar unue li ofte kondutas mallerte kaj strange kaj due li havas pro gena difekto ses fingrojn ĉe ĉiu mano.

Do, Kubo videble estas kaj dume restos afero de la familio Castro. Nature, Raúl ĉiam troviĝis en la ombro de sia internacie multe pli fama frato Fidel, la „ĉefkomandanto" kaj kvazaŭ eterna gvidanto de la kuba revolucio. Sed Raúl estas pli familiema ol Fidel, kiu malrespekte traktis siajn familianojn, al kiuj li havis malbonajn rilatojn kaj kiujn li klopodis teni for de la politiko. Lia fratino Angela mortis en 2012 kaj lia frato Ramón forpasis en 2016. Alia vivanta fratino, Agustina, estas 77-jara. La patro de Fidel havis dek infanojn kun tri virinoj. La filo de Fidel nomiĝas Alex (53) kaj servas kiel oficiala fotografo de la familio, kiun li nomas „dinastio".[19]

---

[18] Laŭ http://www.nzz.ch/international/amerika/partei-kongress-auf-kuba-raul-castro-erklaert-schocktherapie-fuer-ausgeschlossen-ld.14330.
[19] Laŭ http://www.derbund.ch/ausland/amerika/kuba-ist-familiensache/story/17672263.

Aliaj malnovaj potenculoj de la kuba reĝimo estas: *José Ramón Machado Ventura* (85), unu el kvin vicprezidentoj de la Ŝtata Konsilio, kiu sidas en la politburoo de 1975 kaj havas sufiĉe grandan povon.[20] Alia netuŝebla gravega partia kaj ŝtata funkciulo dum jardekoj, *Ramiro Valdés* (83), la plej lasta kun la titolo „komandanto de la revolucio“, aktuale kontrolas la ministeriojn de la konstruado, industrio kaj komunikado.[21] Kaj *Leopoldo Cintra Frías* (74), kiu aliĝis al la ribeluloj kontraŭ Batista, kiam li estis 12-jaraĝa kaj batalis en diversaj militoj en Afriko, estas ministro pri defendo, membro de la politburoo kaj portas la titolon „heroo de la Kuba Respubliko“.[22]

Do, neniu scias, kio okazos en 2018, kiam Raúl demetos siajn funkciojn, ĉar li fere silentas. Estas klare, ke tiu „dinastio“, kiu estas komparebla kun tiu de Ghaddafi, Saddam Hussein, Mubarak kaj Assad, devos komplete malaperi por liberigi la vojon al alia reĝimo en Kubo. La komunisma reĝimo, kiu dum sesdek jaroj grandskale subpremadis sian popolon, lezis, vundis, malliberigis kaj mortigis sennombrajn homojn, perdis ĉian moralan legitimecon kaj ne povas servi kiel idealo por la estonteco de mizera, bankrota ŝtato, kiu plene dependas de eksterlanda mono kaj unue devas leviĝi el la cindro kaj ruinoj. Iam Kubo devos lerni vivi sen la Castro-j kaj sen socialismo. Se aperos kompetenta registaro, tio verŝajne eblos, sed se aperos novaj fuŝuloj kaj banditoj, Kubo estos perdita por ĉiam. Certe, Kubo estas tragika kazo en la monda historio, sed parte la kubanoj kulpas mem pro la mizero, ĉar post 1989 ili havintus la okazon forbalai la kastrisman sistemon, kion ili ial ne faris. Multaj homoj en la mondo ne komprenas tion. Oni devas timi, ke la kubanoj maltrafos ankaŭ la duan okazon, kiu alvenis post la vizito de Obama en Kubo en 2016. Do, kaŭzon por plendi kaj kulpigi eksterlandon, kiu volis helpi al Kubo, ili ne havos.

**Radikala kritiko de kuba disidento: „La Castro-j kastris la propran popolon“**

Multe pli skeptike kaj pesimisme ol oficialaj politikistoj kaj politologoj en Okcidento la situacion en Kubo vidas kritikema kubano mem. En intervjuo kun la svisa gazeto *Der Bund*, la kuba disidenta politologo *Dimas Castellanos* (71) atentigis, ke la situacio de la kuba ekonomio estas tikla: Ĝi estas posedata de la kuba ŝtato je 70 procentoj, daŭre ŝrumpas kaj suferas pro la krizo en Venezuelo, kiu liveras malpli da energio al Kubo ol antaŭe, pro kio aŭtoj, kamionoj kaj busoj ne povas veturi, laboro ne povas esti plenumita kaj elektra kurento estas interrompata. Malgraŭ tio, Castellanos konfirmas, ke Kubo ja moviĝas. Laŭ li, sub Raúl Castro okazis du ege signifaj eventoj por Kubo: sub tiu ŝtatestro multaj aferoj estis ŝanĝitaj, kiuj sub Fidel stagnis, kaj la interpaciĝo kun Usono. Tiuj du okazaĵoj fakte ege skuis Kubon, kvankam ekstere tio ankoraŭ ne estas tre rimarkebla. Laŭ Castellanos, Raúl konsentis pri tiu alproksimiĝo al Usono ĉefe pro tio, ĉar la troa dependeco de Venezuelo ne plaĉis al li. Sed tiu alproksimiĝo eblis nur post la morto de Hugo Chávez (2013) kaj kun Obama persone. Dum kelkaj aferoj do pliboniĝis, aliaj tamen malboniĝis. La bilanco de dek jaroj da raŭlisma regado estas sume negativa, precipe por la plimulto de simplaj kubanoj, por kiuj la vivkondiĉoj restis samaj aŭ eĉ malboniĝis, dum por eksterlandaj turistoj kaj kubanoj kun mono Kubo fariĝis pli bona kompare kun antaŭ dek jaroj. La ŝtato reduktis la monon kaj forstrekis subvenciojn kaj la vivo fariĝis pli kosta. Se oni vojaĝas tra Kubo, oni vidas samtempe pli da bonfarto kaj pli da malriĉeco ol antaŭe. Por la kubanoj tiu situacio estas nova. Preskaŭ ĉio, kio estas nova kaj aspektas bone, estis financita per eksterlanda mono, antaŭ ĉio de familianoj en la miamia ekzilo. Ankaŭ filoj, nepoj, nevoj kaj aliaj parencoj de la kuba potencula elito partoprenas kaj profitas. La homoj scias, ke sen fremda mono kaj bonaj rilatoj la nova komerco ne eblas. Tiu sento estas veneno por la socio. La plimulto de tiuj komercistoj estas blankuloj. Malgraŭ ĉia revolucia propagando la problemo de la abismo inter blankuloj kaj nigruloj neniam estis solvita, ankaŭ en Kubo. Post 1959 multaj blankuloj forlasis Kubon, kiuj konsistigas la plimulton de la ekzilkubanoj. La miliardoj, kiuj nun refluas al Kubo, estas la mono de blankuloj por blankuloj. Sur la insulo restis ĉefe nigruloj, konsistantaj plimulte el malriĉuloj kaj maljunuloj.

---

[20] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/José_Ramón_Machado_Ventura.
[21] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ramiro_Valdés.
[22] Vd. https://es.wikipedia.org/wiki/Leopoldo_Cintra_Frías.

Ke Fidel ankoraŭ vivas, estas granda problemo por Raúl, kiel Castellanos kredas. La pasintaj dek jaroj montris, ke Raúl ne povas tute libere agi tiel longe ke Fidel restas viva, kaj ke neniu scias, kiu kaj kia homo Raúl vere estas. En Kubo ekzistas speco de duobla potenco: la reala potenco de Raúl kaj de liaj lojaluloj kaj la simbola potenco de Fidel, kiu ne devas esti subtaksata. Ĉiam kiam Raúl volas fari novan, pli grandan paŝon, Fidel aperas kiel la sankta spirito, kvankam li nur malofte prezentas sin al la publiko, kaj levas sian timatan fingron por admoni la kubanojn, ke ili ne iru eraran vojon. Castellanos estas konvinkita, ke sen Fidel Raúl estus ŝanĝinta la landon pli rapide. Sed tro drastan ŝanĝon Kubo ne digestus. La kubanoj, kiuj dum sesdek jaroj estis sen libereco, ne eltenus tian ŝanĝon. Aperus anarkio, relative malmultaj homoj venkus kaj la granda amaso perdus. Castellanos timas, ke Kubo riskas perdi la kontrolon pri si mem. Raúl vekas novajn esperojn, kiuj pli malpli frue seniluziigos la homojn. Sed la maljunuloj de la reĝimo ne volas cedi sian povon kaj estas ideologie malkapablaj fari novan komencon. Tio daŭras jam de dek jaroj kaj estas laciga. Multaj homoj perdis la paciencon kaj decidis forlasi la landon, precipe junuloj. Ĉiumonate kelkmil kubanoj forlasas la insulon, ĉar en Kubo ili vidas nenian perspektivon. Naskiĝas ĉiam malpli da infanoj, dum Kubo fariĝas hejmo por maljunuloj.

Al la demando de la svisa ĵurnalisto, kiel Castellanos rerigardas al la erao de Fidel Castro, la politologo respondis: La plej malbona afero, kion la Castro-j faris al la kubanoj estis, ke ili kastris ekonomie kaj politike la propran popolon. Politike, la kubanoj havas nenion por diri kaj ekonomie eĉ ne povas zorgi por si mem. La socialisma Kubo dependas de fremda mono el la kapitalisma mondo, de la turismo, de monĝiroj de familianoj vivantaj en la ekzilo. Ĉar la registaro ne permesas al la propra popolo mastrumi sin mem, ĝi faris el la kubanoj monpetantojn, almozpetulojn kaj trompantojn. Multaj kubanoj pensas ĉiutage nur: kiel mi povas ricevi monon de iu turisto aŭ akiri kelkajn dolarojn per iu rapida komercaĵo, kiam alvenos la venonta ĝiro el Miamio, ktp. La kubanoj priŝtelas kaj trompas la ŝtaton, ĉar ili sentas sin trompataj kaj priŝtelataj de ĝi. Tio estas la plej granda damaĝo, kiun la Castro-j kaŭzis. Ili kreis tiel multajn mankojn kaj bezonojn, ke hodiaŭ ni pretas fari ĉion por akiri kelkajn dolarojn. Tio ne okazus al suverena kaj memfiera nacio. Krom tio, la reĝimo daŭre reagas perforte kontraŭ opoziciaj aktivecoj. La homoj pli timas tiun perforton ol la danĝera fuĝveturo trans la maro. Ekzistas pli kaj pli da kuraĝaj homoj, kiuj ne plu toleras la perforton de la kuba polico kaj kiuj volas partopreni kaj kundecidi. Multaj komprenis, ke la estonteco dependos de ili mem. Tio estas simptomo de espero.

(Dimas Castellanos estas krom politologo ankaŭ teologo. Kiel filo de tabaklaboristo li iam estis konvinkita revoluciulo kaj gvidanto ĉe la junaj komunistoj. En la universitato de Havano li laboris kiel profesoro por marksisma-leninisma filozofio. En 1992 li estis maldungita pro „ideologiaj diferencoj“. 15 jaroj li aktivis en la disidenta movado, sed de dek jaroj li ne plu apartenas al ĝi kaj estas aŭtoro. Vivante en Havano, siajn artikolojn li povas publikigi nur en eksterlando.[23])

Fine kelkaj interesaj statistikaj ciferoj:
Laŭ la *Indekso pri demokratio* de la gazeto *The Economist* Kubo situis en 2014 sur la ege malbona 127a de 167 rangoj. Laŭ la *Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House* Kubo okupas la tre malbonan 177an rangon kune kun Norda Koreio, kiu troviĝas ĉe la fino, kaj laŭ la listo *de Reporteroj sen limoj* ĝi okupas la tre malbonan 171an de 187 rangoj, do la situacio de la gazetara mallibereco estas taksata kiel „tre serioza“. Laŭ la *Indekso pri percepto de korupto de Transparency International* Kubo tamen okupis en 2015 la relative bonan 56an de entute 168 rangoj, antaŭ Grekio, Rumanio kaj Italio. Fine, laŭ la *Monda Evolua Indekso* (Human Development Index) Kubo situas sur la sufiĉe bona 44a rango (de 175), antaŭ Kroatio, Latvio kaj Argentino.

* * * * *

© Teksto originale prilaborita en Esperanto de Andreas Künzli, lic. phil., Berno (Svislando) kaj publikigta sur www.planlingvoj.ch en septembro 2016. La verkinto vizitis Kubon en la jaro 1990.

[23] Laŭ http://www.derbund.ch/ausland/standard/die-castros-haben-ihr-eigenes-volk-kastriert/story/29822767